

VROCLAVANO

BIULETYN WNEWNETRZNY
Wrocławskiego Oddziału "ODRASILEZIE"
Związku Esperantystów w Polsce.

Nr. 6 G r u d z i e Ń - D e c e m b r o 1951.

Ostatni miesiąc roku - grudzień - jest zazwyczaj okresem robienia rachunku sumienia za ubiegły rok. Długie wieczory grudniowe usposabiają do rozmyślań i rozważań. Spróbujmy więc, spoglądając wstecz, sporządzić bilans wyników naszej działalności wydawniczej i ocenić mniej więcej rezultaty naszej ogólnej działalności w dobiegającym końcu roku.

Numer niniejszy zamyka pierwszy rok wydawnictwa naszego biuletynu. Był to rok próby, która się udała, a jej wyniki okazały się nie tylko usprawiedliwieniem dla inicjatywy wydawania takiego pisma, jak nasze, ale także potwierdzeniem słuszności tych założeń, z jakimi przystępowaliśmy do tej pracy. Na samym wstępie zdawaliśmy sobie sprawę z tego, że to praca niełatwa. Tę też wypadł nam p k n y w a ć trudności techniczne, jakie piętrzyły się przed nami - na drodze wydawania naszego biuletynu. Brak własnej maszyny do pisania, brak własnego p w i e ł a c z a, nierzadko brak papieru cyklostylowego lub dobrych matryc - to główne elementy wspomnianych trudności technicznych, które niejednokrotnie były przyczyną opóźnień w ukazywaniu się biuletynu "Vroclavano". Ale ofiarna praca całej garsteczki spośród wrocławskich esperantystów oraz ofiarna samopomoc finansowa nieco szerszego, ale również skromnego grona naszych członków i sympatyków - sprawiły, że wbrew tym trudnościom jednak wydawaliśmy nasze pismo. Moral-

nya będącym do stawiania czoła wspomnianym przeciwnościom były wyrazy uznania i zachęty, napływające zewsząd od naszych czytelników oraz kilka wzmianek o naszym "Vroclavano", jakie ukazały się w sześciu czasopismach esperanckich różnych krajów.

I oto owocem naszej rocznej działalności wydawniczej jest sześć numerów biuletynu "Vroclavano". Przeglądając ten pierwszy rocznik, z łatwością stwierdzić można, że pismo nasze pod względem poziomu i zakresu przebyło wyraźną ewolucję i wykazuje tendencję do dalszego rozwoju. Napawa to nas uzasadnionym zadowoleniem, pomnożonym jeszcze o świadomość tego, że "Vroclavano" stanowi skromny nasz wkład do rozwoju czasopiśmiennictwa esperanckiego.

Rok 1951 zaznaczył się poważnym ożywieniem i konsolidacją działalności naszego Oddziału - w porównaniu z rokiem poprzednim. Pokażny rejestr naszych zebrań klubowych, ciekawa tematyka odczytów, odpowiedni poziom innych imprez, jak: Wieczór Chiński, Wieczór Moniuszkowski oraz Wieczór ku czci Zamenhofa, szereg udanych wycieczek, rozwijająca się korespondencja międzynarodowa - oto w głównym zarysie przejawy naszej działalności w kończącym się roku. Do osiągnięcia tych wyników wielce przyczynił się nasz biuletyn, którego mobilizująca rola zaznaczyła się w stopniu pokaźnym. Spodziewać się wypada, że w przyszłości rezultaty naszej pracy mogą i powinny być jeszcze znacznie lepsze - pod warunkiem, że współpraca nas wszystkich będzie wydajniejsza, a szczególnie współpraca tych, którzy powinni poczuwać się do obowiązku większej aktywności.

Kończąc ten przegląd, wyrażamy życzenie, by nadchodzący rok 1952 był rokiem wzmocnienia i utrwalenia fundamentów pokoju na świecie, a także rokiem znacznego rozwoju ruchu esperanckiego.

==== // ===== // =====
///



Eminentaj geniuloj ne estas ĉiutaga
speraĵe en la homara historio, kvankam
tiu ĉi havas ne malkonsiderindan regi-
stron de ili. Karakteriza trajto de ve-
re eminentaj geniuloj estas la al ili
propra modesto, fontanta el ilia elsta-
reco super la intelekta nivelo de mez-
uloj.

Tia vere eminenta geniulo kaj modesta
homo estis la kreinto de Esperanto.

Jam en sia junaĝo li estis "obsedita"
de alta nobla ideo - doni al la homaro ilon, kiu faciligos
al ĝi la kreon de harmonia kunvivado de ĝiaj diversnaciaj
konsistopartoj. Tiun ĉi celon, kiun li starigis antaŭ si,
li atingis, donacinte al la ĝis tiam ĉi-rilate senhelpa ho-
maro mirindan ilon per vere mondskala interkomprenado kaj
profunda amikiĝo. La ilo estas nia kara Esperanto - genia
sintezo de kulturaj lingvoj, - sintezo, "en kiu estas ente-
ritaj ĉiuj valoroj kaj anasigitaj ĉiuj bonoj" - kiel diris
la fama franca verkisto Henri Barbusse, la flanca inter-
naciisto kaj pactatalinto.

Antaŭ 92 jaroj naskiĝis la bonfarinto de la homaro -
D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof. Li ne nur kreis la interna-
cian lingvon, genie konstruitan, sed ankaŭ iniciatis mova-
don, kies enhavo estas multe pli esenca, ol unuavide povas
ŝajni al eksterulo. La seriozaj esperantistoj bone konscias
pri la alta kulturvaloro de la Esperanto-movado, sed ili
ankaŭ profunde sentas en siaj koroj ĝian subliman enhavon.

La dankema Esperantistaro jam de pluraj jaroj solene fe-
stas la naskiĝtagon de sia Majstro - proklamante ĝin Tago
de la Esperanta Libro, Okaze de la 15-a de Decembro, ĉe la
esperantistoj enradikiĝis bela kutimo interdonaci novaĵojn
de la Esperanta libro-merkato. Motivo por enkonduki tiun
ĉi kutimon estis sendube la penso stimuli la disvolviĝon de
la Esperanto-literaturo, kiu estas ja la ĉefa bazo de plua
prospero de nia movado. La nunaj devizaj cirkonstancoj en
la mondo bedaŭrinde malfavoras al plena flegado de tiu ĉi
bela kutimo. Sed la bonkoraj esperantistoj tutmonde iel
scias helpi al si reciproke en ĉi-rilato, inde honorante
tiamaniere la memoron de la Majstro - okaze de lia naskiĝ-
tago.

Malĝojige pezaj nuboj kovras nun la ĉielon kaj minace
pendas super la mondo, paca sopiranta. Sed alvenos tago,
kiam la nuboj cedos lokon al vivdona sunbrilo, kiu inaŭgu-
ros novan epokon en la homara historio - epokon de Paco,
Bonfarto kaj Progreso. Ankaŭ por nia movado ĝi estos epoko
de granda disvastiĝo. Kaj tiam la paco kaj progressa homaro
dankene starigos, en ĉiuj anguloj de la mondo, imponajn mo-
numentojn al la modesta geniulo, donacinta al ĝi la mi-
rindan ilon, kies nomo estas Esperanto. -

15 Decembro 1951.

J.G.

- El la Esperanto-movado. -

ZAMENHOF - MONUMENTO en WÜRGL.

"Informletero" - bulteno aperanta en Würgl /Aŭstrio/ - en siaj lastaj numeroj informas, ke venontsomere en tiu urbo estos soleme inaŭgurita bela Zamenhof-monumento. Kun granda ĝojo ni ekscias detalojn pri tiu ĉi planata solenaĵo.

Iaŭ iniciato de s-ano Hans Steiner, viceprezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio kaj Eop.-landestro per Tirolo kaj Vorarlberg, - la urba konsilantaro de Würgl kaj ties urbestro disponigis parton de plej bela placo de la urbo - la stacidoma placo - por starigi sur ĝi monumenton al la kreinto de Esperanto.

La Zamenhof-tusto, kiun en "Carrara"-marmoro senkoste skulptos tirola samideano Theodor Ohnesorge, staros sur soklo el tirola granito. Krome la soklo surhavas konforman marmortabulon. La tuta monumento staros enmeze de florumarko.

La solena inaŭguro de la Zamenhof-monumento estas cka-zonta la 27-on de Julio 1952. Ĝin partoprenos espereble multaj esperantistoj aŭstriaaj kaj alilandaj, precipe la veturontaj tra Aŭstrio al la 37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo /Norvegio/.

Jan kreigis Monument-Komitato, kies honora protektanto estas la aŭstria kanceliero D-ro Leopold Figl, kiu ankaŭ persone faros la inaŭguron de la monumento. La honora komitato konsistigas diversaj sociaj eminentuloj de Aŭstrio kaj ankaŭ diverslandaj eminentuloj de la Esperanto-movado.

Ni kore antaŭĝojas pri tiu solenaĵo, kiu certe estos granda manifestacio de la esperantista volo al paco tutmonda, kaj ni sincere gratulas kaj dankas al la urbestro de Würgl pro la afabla disponigo de konforma loko por la monumento kaj pro lia aktiva partopreno en la monument-komitato.

Nian sinceran gratulon kaj dankon akceptu ankaŭ s-ano Hans Steiner la iniciatinto kaj meviga spirito de la tuta afero.

Al ĉiuj niaj legantoj ni varme rekomendas skribi gratulkaj dank-leterojn al la urbestro de Würgl /S-ro Kom.kons. Martin Fichler, urbestro, WÜRGL, Tirolo, Aŭstrio/- por montri la viglan partoprenon de ĉiulandaj esperantistoj en afero, koncernanta la reprezenton de la Esperanto-ideo kaj la honorigon al Zamenhof. -

- / - / - - / - / - - / - / -

. / .

LANDA KONFERENCO en VARSOVIO.

La 2-an de Decembro 1951 en Varsovio okazis Kunsido de la Asocia Konsilantaro de A.E.P. kun esperantistaj aktivuloj de nia lando. Alvenis 35 gesamideanoj el diversaj partoj de Pollando. La Vroclavan Filion reprezentis ŝtanoj Jakob Garbar kaj Robert Czechowski.

La celo de la Konferenco estis prikonsideri la nunan situacion de nia landa Esperanto-movado kaj prepari laborplanon por la proksima estonteco.

En raporto de la Ĝenerala Sekretario de nia Asocio - s-ano Dratwer, - ni eksciis pri grandega laboro farita de la Ĉefa Estraro en malfacilaj kondiĉoj. La Ĉefa Estraro estas en kontakto kun la ŝtataj aŭtoritatoj kaj klopodas pri eldono de esperantlingvaj tröŝuroj pri Pollando, pri presigo de vortaroj kaj lernolibroj. Nesufiĉa estas la financa subteno al la Ĉefa Estraro flanke de la pola esperantistaro, kaj tiu ĉi neglektado estas bedaŭrinda. Se ĉiuj pollandaj esperantistoj pagus regule siajn kotizojn, estus kreita materiala bazo por normala agado de la Ĉefa Estraro.

En vigla diskuto partoprenis pluraj gesamideanoj, kiuj rakontis interesajojn pri la agado sur iliaj terenoj. Apartan motivon en la diskuto formis la bezono kontraŭbatali la malgustan opinion pri kvazaŭa kosmopolitismo de la Esperanto-movado. Oni akcentis la neceson konstante ĝustigadi tiun ĉi falsan opinion kaj emfazi pri la sendiskuta taŭgeco de Esperanto en la porpaca batalo.

Estis akceptitaj du rezolucioj - alvokoj al la pollanda kaj tutmonda esperantistaro koncerne pliaktivigon en la porpaca agado.

La Asocia Konsilantaro alvokis ĉiujn pollandajn esperantistojn al pli aktiva partopreno en la movado, kaj precipe:

- 1/ ke oni regule pagadu la membrokotizojn,
- 2/ ke ĉiu pollanda esperantisto subtenu la centran gazeton "Tra la Mondo kaj Literaruto", abonante ĝin almenaŭ po 2 ekzempleroj, t.e. unu - por si mem, kaj la duan - por sia eksterlanda korespondaniko. Oni remoru ankaŭ, ke ankoraŭ estas haveblaj la jarkolektoj 1950 kaj 1951.

La Asocia konsilantaro esprimis dankon al la Ĉefa Estraro pro ĝia laboro kaj rekomendis al ĝi fari la necesajn paŝojn por okazigi landan Esp.-kongreson printempe de la venonta jaro. -

.
.

- LA FESTIVALO DE POLA MUZIKO. -

Simfonia koncerto, piana recitalo, ĥora konkurso, kanta vetbataloj - vokas la afiŝoj sur la muroj de Varsovio kaj informas la urbanojn pri okazanta granda festivalo de pola muziko. Amasoj da homoj svasmas vespere en la operejo kaj admiras la tonojn de pure pola muziko kaj la simplajn,

hejmlandajn vortojn de popolaj kantoj. Ne "Traviata"-n "Carmen"-on prezentas la operoj, nek Bethovencn aŭ Mozarton ludas la orkestroj, sed la muzikverkajoj de Meniuszko kaj Chopin, de Panufnik kaj Szeligowski kortuŝas la entuziasmojn de bona muziko. La Varsovia operejo estas ĉiam plena, kaj oni aŭdas homojn en la stratoj diskutantajn pri "muzikaj problemoj". Do, la celo de la festivalo - pligrandigi la interesiĝon pri muziko inter la popolamaso - farigis senduba sukceso.

Kio estas tiu Festivalo kaj kiam ĝi komenciĝis? En la mezo de aprilo ĉi-jara okazis en Varsovio la inaŭguro de impona festivalo dediĉita al pola muziko. Poste, ĝis la unua de majo, oni prezentis festivalajn koncertojn kaj operojn sur la estradoj de diversaj urboj. Sekvis dua parto de la festivalo, kiu daŭris ĝis la 30-a de novembro; el diversaj vilagoj kaj urboj, poste el distriktoj estis elektitaj plej bonaj orkestroj, kantistoj, ktp. Ĉirkaŭ 3000 amatoraj grupoj vetbatalis por partopreni en la finala prezentado de operoj, koroj kaj orkestroj sur Varsovia estrado. Dum la Radio dissendis prelegojn pri eminentaj polaj komponistoj kaj la muzikeldonejoj publikigis verkojn pri la kanto kaj muziko popola. La tutpola kanto-konkurso elektis la plej bonajn kantistojn nuntempajn. Plej valoraj verkajoj de polaj komponistoj estis premiitaj, kiel ekz. "Paĉa Simfonio" de Panufnik aŭ la nova opero de T. Szeligowski. La kreanta laboro de komponistoj estis grandega, se oni konstata, ke ili verkis pli ol 50 grandajn simfoniojn, 20 kantatojn, 2 operojn kaj multajn aliajn muzikverkajojn.

La Festivalo ankoraŭ ne estas finita. La tria, la finala parto komenciĝis. Ĝi elektos la novajn talentulojn, kiuj reprezentos kaj suprenlevos la muzikon. La pola verkisto J. Waldorff pravis opiniante, ke:

"hodiaŭ - tra la Festivalo de Pola Muziko - okazas batalo kiu daŭros ĝis la plena venko de la muziko. Batalo, por ke Polujo estu inda ĝian samlandanon, la faman Chopin."

Jadwiga Rydygier
/Varsovio/

= . = . = . =

- N I A K R O N I K O -

ZAMENHOFA VESPERO.

Okaze de la 92-a naskiĝtago de D-ro Zamenhof, sabate la 15-an de Decembro 1951, en la sidejo de nia Filio okazis solena Zamenhofa Festvespero. En konforme ornamita salono de la teretago kunvenis are da vroclovaj esperantistoj por honori la memoron de la Majstro.

La programo komenciĝis per enkondukaj vortoj de prof. Jakob Garbar. En pollingva parolado ing. Eugeniusz Misiurewicz prezentis la vivovoĵojn de la kreinto de Esperanto - celante precipe la partoprenantojn de la nova Esperanto-kurso, kiuj ĉeestis la Festvesperon. Interesan paroladon titolitan "Mia unua renkontiĝo kun D-ro Zamenhof" faris la Ĉefdelegito de UEA por Pollando, advokato Roman Sakowicz, speciale alveninta el Nowa Sól.

La klasikajn poemojn de Zamenhof - "La Vojo" kaj "La Preĝo sub la Verda Standardo" - tre bone kaj sentoplene deklamis alterne samideaninoj Donata Malincevska kaj Apolonia Kurzec.

La solena parto de la Vespere finiĝis per kantado de "La Internacio" kaj "La Espero".

Sekvis modesta bankedeto, dum kiu oni tostis, manĝis kaj bone amuziĝis ĝis malfrua vespero. -

KLUBAJ KUNVENOJ.

La programeco de niaj klubaj kunvenoj, interrompita por la somermonatoj, estis nun restarigita. El la intertempe okazintaj kunvenoj speciale menciindaj estas la jenaj:

27. Oktobro - Ing. Eugeniusz Misiurewicz prelegis pri: "LA GRAVECO DE NIA INTERNACIA KORESPONDADO". Priparolinte la avantaĝojn kaj utilojn, kiujn donas al ni la internacia korespondado, la preleginto akcentis, kiaj devas esti la ecoj de niaj korespondadoj laŭhabe kaj laŭ ilia ekstera aspekto. Fine li substreke atentigis pri la graveco de la esperantista "parokano". -
24. Novembro - Tre valoran kaj interesan prelegon titolitan: "IOM DA MATEMATIKO POR ĈIUJ" - prezentis al ni ing. Eugeniusz Misiurewicz. Li enkondukis la aŭskultantaron en la esper. matematikan terminaron, parolis pri diversaj branĉoj de matematiko /Aritmetiko, algebro, geometrio, trigonometrio, analitika geometrio, diferencaja kaj integra kalkuloj/ kaj pri la historio de la nombro "Pi" /la areo de la rondo/. -
8. Decembro - Prelego de prof. Jakob Garbar havis la titolon: "ESPLORISTAJ TRAVIVAĴOJ EN AFRIKA PRAARBARO". La preleginto prezentis interesan historion de du scienc-esploraj vojaĝoj de aŭstria scienculo-vojaĝisto D-ro Emil Holub en la sovaĝa interno de la suda parto de la "nigra kontinento", okazintaj en la lasta kvarono de la pasinta jarcento. Li menciis ankaŭ, ke espereble post nelonge ni povos rigardi interesan filmon pri tiuj vojaĝoj, ĉar oni probable nun pretigas tian en Praha /Ĉeĥoslovakio/. -

EKSKURSO.

Dimanĉe, la 21-an de Oktobro, ni okazigis ekskurson al la Silezia Muzeo en Vroclavo. La ekskurson partoprenis 5 membroj de nia Filio. Oni vizitis tie kvar interesajn ekspoziciojn: Fotografian Ekspozicion, Ekspozicion de moneroj kaj stampoj de la mezepoka Malsupra Silezio, Ekspozicion de Sovetaj Grafikajoj kaj la Pentroartan Galerion. -

NOVA ESPERANTO-KURSO.

La 20-an de Novembro komenciĝis nova Esperanto-kurso por komencantoj, kun partopreno de 15 personoj. La kurso estas gvidata de prof. Jakob Garbar kaj okazas dufoje ĉiusemajne /marde kaj ĵaŭde/. -

-. - . - . - . - . - . - . - . -

- S P R A W Y B I E Ŝ A C E -

ZEBRANIA KLUBOWE.

Kalendarzyk naszych zebrań klubowych, odbywających się w soboty w godz. 18-21 w siedzibie Oddziału /II piętro/, na najbliższy okres przedstawia się następująco:

- 19 stycznia - Viva Gazeto. -
- 26 stycznia - Inż. Eugeniusz Misiurewicz: "Kio estas la dialektika materialismo?". -
- 2 lutego - Prof. Marian Tyszkiewicz: "La signifo de la mallarga filmo en la moderna vivo." -
- 16 lutego - Viva gazeto. -
- 23 lutego - Mgr. Tadeusz Jarzębowski: "Ĉu ekzistas vivo sur aliaj planedoj?". -
- 1 marca - Viva Gazeto. -
- 8 marca - Prof. Jakob Garbar: "Iom el historio de la skribarto." -

Zarząd Oddziału Wrocławskiego prosi o zgłaszanie tematów i terminów prelekcji na następny okres.

Jednocześnie apeluje się do wszystkich członków o liczne i punktualne przybywanie na zebrania. -

SPRAWY FINANSOWE.

Kol. Skarbnik prosi o uregulowanie wszystkich zaległości z tytułu składek członkowskich, opłat biblioteczných, "cegiełek" oraz inych należności, przypominając, że wpłaty czynić można również na nasze konto w P.K.O. Nr. VIII-6511/113 /Związek Esperantystów w Polsce, Oddział we Wrocławiu/. -

-. - . - . - . - . - . - . - . -

Pamiętajcie o naszym funduszu wydawniczym!!

-. - . - . - . - . - . - . - . -

E K R I D E T U !

Dum societa kunveno iu sinjorino demandis Balzac-on, ĉu li efektive bone konas la virinojn.

- Tiel bone - respondis la verkisto - ke al mi sufiĉas nur unu rigardo, por ke mi povu rakonti vian tutan vivon, sinjorino.

- Nur ne tiel laŭte, pro Dio! - petege prononcis la sinjorino. -

XX

Foje Voltaire kartludis kun iu pia virino, kiam subite ekfulmotondris. La piulino komencis krucosigni sin, esprimante timon, ke en tia momento ŝi ĉeestas kun ateisto, kiun Dio ĉiun momente povas ekbati per fulmotondro.

- Bonvolu scii, sinjorino, - diris Voltaire - ke mi en unu verso pli diris pri Dio, ol vi dum tuta vivo pri Li pensis. -

/Ensendis: Józefa Sitek/.

XX

NI KVITANCAS: /3-a listo/.

Por nia eldona fonduso enfluis la jenaj pagoj, kiujn ni danke kvitancas:

- Grum Jerzy - 5 zł., Piątkowski Jacek - 10 zł., Sitek Józefa - 30 zł., Dąbrowski H. /Wolanów - 5 zł., Filc Jerzy /Jelania Góra/ - 30 zł., Parczyński Eugeniusz /Karsznice/ - 10 zł., Popławski Jan /Poznań/ - 20 zł., Rosłonec /Łódź/ - 2 zł., Rydygier Jadwiga /Warszawa/ - 20 zł., Sichatynski Wilhelm /Przemyśl/ - 20 zł., Sygnarski Mieczysław /Kraków/ - 10 zł., Walas Franciszek /Bielske/ - 5 zł., Zawada Jan /Warszawa/ - 2 zł.

=====

Al ĉiuj niaj Legantoj ni bondeziras

FELIĈAN NOVAN JARON 1952 !

La nova jaro estu per ni ĉiuj jaro de persona bonfarto kaj prospero, jaro de firmiĝo de la tutmonda paco!

La nova jaro 1952 estu pli favora, ol la antaŭa, al nia movado kaj alportu al ĝi prosperon kaj novajn sukcesojn!

=====

KORESPOND-ANONCOJ:

=====

- Ĉeĥoslovakio -

- S-ro Miloš Ther, Masarykovo Nám. 78, POLECE nad Metuji -
deziras korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj.

- S-ro Luboš Kretzschmar, Pionyrska 546, LANŠKROUN - dezi-
ras korespondi pri junularaj aferoj.

- Francio -

- S-ro L. Gacguer, 57 Boulevard Thiers, AMIENS /Somme/ -
deziras intersangi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

- Japanio -

- S-ro Terumichi Takisawa, Aomori-ken, Togun, Singyo 131,
AINO - Il-jara studento deziras intersangi poŝtkartojn
kaj poŝtmarkojn. -

=====

N I A A D R E S O :

Asocio de Esperantistoj en Pollando, Filio "Odrasilezio"
Związek Esperantystów w Polsce, Oddział "Odrasilezio"

W R O C Ł A W , ul. Swierczewskiego 104.

=====

